

N o v a j l e t e r o

Antaŭparolo

Dum la pasintaj monatoj multe okazis. La Bruĝa Grupo Esperantista kaj la Bruĝa Junulara Grupo decidis kunlabori, oni elektis novan (kvankam provizoran) estraron. Tadeo Ilow prelegis pri Aŭstralio, la estraranoj pristudis la statutojn...

Mi pardonpetas ĉar ne ĉiuj gemembroj ĝustatempe ricevis la necesajn informojn. Nun la organizaj problemoj estas pli malpli solvitaj kaj mi esperas regule sendi al vi novaĵojn.

Ĝis baldaŭ !

Roland Rotsaert

Nova Estraro

Prezidanto	Roland Rotsaert
Vicprezidantoj	M. De Baets-Huyghe D. Demoulenaere
Sekretarioj	Jean Pierre VandenDaele Oliva Van Eeghem
Kasistino	Y. Christiaens-Poupeye
Bibliotekistino	Mady Willems
Reprez. "Jeugdraad"	André Ruysschaert
Komitatanoj	Julien Eneman Isabelle Van Parys Yolande Van Parys

Vizito el Pollando

Laŭ invito de FLEJA (Flandra Esperanta Junulara Asocio) 4 poloj partoprenos al FLEJA-renkontiĝo en Wavre (28 ĝis 30 okt.) Ili poste vizitos nian landon kaj intencas alveni en Bruĝo la 1an de novembro. Vespere ni planas interkonatiĝo kun nia grupo en "De Wandelinghe" kaj la 2an de novembro vizito al la urbo.

Cu iu pretas loĝigi unu el ili dum unu nokto ?

Renkontiĝo en Aylesford

De la 21a ĝis la 23a de oktobro okazos E-renkontiĝo en Aylesford (vilaĝo apud Maidstone, Kent). Jam kelkaj bruĝanoj anoncis sin. Detalaj informoj estos baldaŭ haveblaj.

Danci en Antwerpen

La 5an de novembro FEL organizos Esperanto-balon en Alpheusdal, F. Williotstr., Berchem. Kartoj en antaŭvendo kostas 200 fr.; specialaj prezoj por junuloj. Tranoktado ĉe gesamideanoj eblos. Petu informojn de Flandra Esperanto-Ligo aŭ RR.

Por mia unua vizito al Hungario, mi decidis iri trajne. Tio ne nur estis la plej malmultekosta solvo, sed ankaŭ donis al mi eblecon jam dumvoje konatiĝi kun aliaj kongresantoj. Sinsekve suriĝis la trajnon la britoj, belgoj, nederlandanoj, germanoj, aŭstroj kaj italoj: ju pli ni proksimiĝis al Debrecen, des pli granda iĝis la junulara Esperantogrupo. Fine, post trajnvojaĝo de 24 horoj, mi atingis la IJK-urbon.

En la kongresejo mi jam vidis kelkajn konatajn vizaĝojn, sed antaŭ ĉio mi volis refresiĝi kaj manĝi. Granda seniluziigo: neniu LMK-ano povis konduki nin al nia loĝejo, ĉar ili "ne respondecas pri tio": ni devis atendi ĝis post la Solena Inaŭguro. Vi komprenas ke ni tute ne ŝatis aŭskulti paroladojn kaj rigardi hungarlingvan filmon, en niaj malfreŝaj vestaĵoj, kun pakaĵoj kaj malplena stomako. Post la inaŭguro kaj post multaj demandoj iu montris nian loĝejon sur mapo, sed ne kondukis nin tien kiel oni antaŭe promesis. Kiam ni trovis la konstruaĵon jam estis post la deka vespere kaj kompreneble je tiu horo ne plu eblis manĝi.

Dimanĉe, la "serioza" programo komenciĝis: la temo de la kongreso estis "Informfluo en la nuntempa mondo" kaj ĝin traktis kelkaj prelegoj. La unua jam malsukcesis: ĝi estis hungarlingva kun samtempa Esperantotraduko. Aldonu la tro teorian enhavon, kaj vi facile komprenas kial multaj ĉeestantoj foriris antaŭ la fino de la prelego. (La saman sorton spertis la teatraĵo kelkajn tagojn poste, kiun multaj spektantoj opiniis tro avangarda.) Posttagmeze okazis tute unika programero: "etkurado" de la stacidomo ĝis la urbocentro, kiu kontraŭ miaj timoj sukcesis: kelkaj centoj da gejunuloj kuris kun kelkaj verdaj flagoj, kantis Esperante kaj ĉeestis mallongan solenaĵon apud Zamenhof-memorŝtono. Dum la vespera dancado vizitis nin du flandraj junuloj ne-esperantistaj, kiuj hazarde aŭdis pri ia internacia kunveno kaj decidis serĉi flandrojn tie.

Kio pli estis en la programo? Mi nur donos kelkajn erojn: kiel kutime dum IJK okazis tuttaga ekskurso, kies celo estis la puŝto "Hortobagy". Originala kaj memorinda estis la dumnokta subĉiela banado en banejo kun kuraciga akvo. Ĝis la unua matene daŭris la Internacia Vespero, precipe ĉar la orient-eŭropaj grupoj amase partoprenis kaj kvazaŭ invadis la podion. Menciindas ankaŭ la tutsemajna mikrokomputila ekspozicio, la sinprezento de kelkaj landaj sekcioj de TEJO kaj la pupteatraĵo. Sed kiel ĉiam, la plej interesa okazis ekster la oficiala programo: dancado, kantado kaj babilado kun plej diversnaciaj homoj.

Nu, ĉu mi ankoraŭ grumblu pri la grandaj distancoj inter la kongresejo kaj la loĝejoj, pri la monotonaj manĝoj, pri la tro altnivela kongrestemo, pri la manko de laborgrupoj, pri la kelkfoje grandaj malfruiĝoj aŭ eĉ pri la 200 (jes, ducent) polaj krokodiloj? Kiel dirus iu ajn kongresinto: "SED TUTE NE GRAVAS".

André Ruysschaert

Vi denove ricevos novaĵleteron en la dua parto de oktobro. En ĝi interalie estos raporto pri la Universala Kongreso en Budapeŝto kaj pliaj informoj pri la pola vizito.

Ni bonvenigas la reagojn de legantoj!

Propozo de adaptitaj statutoj (estrarkunveno 23.08.31)

- Par. 1a En Bruĝo estas fondita, dum oktobro 1902, Grupo, kies celo estas: propagandi kaj instrui la helpan lingvon internacian "ESPERANTO", laŭ ties Fundamento kaj la decidoj de la Lingvaj Institucioj.
Ĝi estas titolata: "BRUĜA GRUPO ESPERANTISTA", en la nederlanda "BRUGSE ESPERANTO-GROEP".
Laŭ Reĝa Dekreto de la 12a de novembro 1932, ĝi estas rajtigita aldoni al sia titolo la mencion: "Reĝa Societo" ("Koninklijke Maatschappij").
Ĝia devizo estas: "Unueco donas fortecon".
- Par. 2a Ĝi estas neŭtrala rilate al ĉia politika, religia, filozofia aŭ necilingva demando.
La oficiala lingvo de la grupo kaj de ĝiaj kunvenoj estas Esperanto. En okazo de necesa uzado de naciaj lingvoj, la Komitato decidas laŭ konveno kaj taŭgeco.
- Par. 3a Bruĝa Grupo Esperantista estas aliĝinta federacie, kaj individue por ĉiuj sia membroj, al Flandra Esperanto-Ligo (FEL), kaj pere de tiu lasta al Belga Esperanto-Federacio (BEF) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA), kaj apogas laŭeble la agadon de tiuj tri organismoj.
- Par. 4a Ĉiuj grupanoj aktivaj pagas jaran kotizon. pri kiu decidas la komitato. La titolo "Protektanta Membro" estas rezervata al personoj, kiuj pagas minimume 1000 fr. aldone al la normala kotizo.
La Komitato povas doni la titolon "Honora Membro" al personoj, kiuj faris gravajn servojn al la esperanta afero. Se la titolo "Honora Membro" estas aljuĝata al ekzistanta komitatano, tiu povas konservi la honoran titolon de sia komitata funkcio.
Ĉiuj membroj aktivaj, protektantaj kaj honoraj estas samrajtaj rilate al la administrado de la grupo. La membroj protektantaj aŭ honoraj, kiuj ne estas esperantistoj, ne rajtas voĉdoni nek partopreni en la Komitato.
- Par. 5a Neniu grupano rajtas fari poresperantan publikan propagandon, nek organizi aŭ gvidi kursojn de Esperanto, sen antaŭa aprobo de la Komitato, aŭ de la Prezidanto en urĝaj okazoj.
- Par. 6a La societa jaro komenciĝas je la 1a de januaro.
- Par. 7a La komitato zorgas pri ĉiuj propagandaj rimedoj, pri la organizado de elementaj kaj superaj kursoj, pri la administrado kaj pliriĉigo de la biblioteko, kaj alprenas ĉiujn iniciatojn, kiujn ĝi opinias utilaj je la plenumo de la societa celo.
- Par. 8a La Grupo estas administrata de Komitato konsistanta el: unu Prezidanto, unu aŭ du Vicprezidantoj, unu Sekretario kaj unu Kasisto; ĝi povas plie enteni laŭbezone Helpan Sekretarion kaj tiom da membroj kiom montriĝos necese.
La komitato estas elektata ĉiujare de la ĝenerala kunveno laŭ la plimulto de la voĉdonoj kaj per sekreta baloto. Ĉiu voĉdonrajta membro skribas sur paperon maksimume tiom da nomoj de grupanoj, kiom estas da komitataj postenoj. Tiu voĉdonado estas kontrolata de la eliranta komitato, helpata de la plej malnova kaj de la plej junaĝa ĉeestantaj grupanoj.
La tiel elektitaj komitatanoj dividas inter si la komitatajn postenojn. La daŭro de ilia komisio estas de unu jaro, t.e. de unu laŭstatua ĝenerala kunveno ĝis la sekvonta.
Ili estas ĉiam reelekteblaj.
Se unu aŭ pluraj anoj de la Komitato ĝin forlasas dum la jaro, ili estas provizore anstataŭataj laŭ la elekto de la Komitato mem, de aliaj grupanoj, kiuj daŭrigos la komision de la foririntoj.
Se dum la pasinta jaro, neniu ano de la Komitato ĝin forlasis, kaj se neniu ekzistas el ĝi dum la ĝenerala kunveno, tiu lasta povas reelekti entute la estrantan Komitaton, sen sekreta baloto.
En okazo de samnombraj voĉoj, tiu de la Prezidanto aŭ de lia anstataŭanto estas decidiga.

- Par. 9a La akcepto kaj la eksigo de grupano estas decidotaj de la Komitato laŭ la plimulto de la voĉdonoj de la funkciantaj membroj. Grupano, kies konduto aŭ neobservado de la statuto okazigas proponon de eksigo, estas antaŭe invitata per prezenti sian defendparoladon.
- Par. 10a La grupa monhavaĵo povas esti elpezata nur per la antaŭenirigo de la esperanta movado, laŭ la celoj kaj rimodoj montritaj en la paragrafoj 1a kaj 7a de la jena statuto.
La kasisto estas persone responde pri tiu monhavaĵo kaj devas pravigi ĉiujn elspezojn per fakturoj aŭ pagmandatoj aprobitaj de la Prezidanto, aŭ de lia anstataŭanto en okazo de nepra malhelpo. Je la lasta komitata kunveno antaŭ la jara ĝenerala kunveno, la Kasisto prezentas sian bilancon, por eventuala aprobo. La Prezidanto kaj la Sekretario certigas tiun aprobon per siaj subskriboj.
- Par. 11a La Grupo povas esti dissolvata nur per decido de speciala ĝenerala kunveno laŭ la du triona plimulto de la voĉdonoj de la ĉeestantaj membroj. En tia okazo la grupa monhavaĵo kaj objektaj propretoj estas donacataj al iu alia esperanta organizaĵo, aŭ disdonataj inter pluraj laŭ kontrolo de la likvidanta Komitato. Se eble, la sekvantaj organizaĵoj havos laŭordan rajton de prefero:
1a Flandra Esperanto-Ligo.
2a Belga Esperanto-Federacio.
3a Universala Esperanto-Asocio.
Se transdono al iu ajn esperanta organizaĵo ne plu estas ebla, la donaco devus almenaŭ profitigi al pacema aŭ homarama institucio kun internacia karaktero.
- Par. 12a Ĉiujare okazos la ĝenerala kunveno dum januaro.
Ĉe tiu kunveno estos unue legata la protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno, poste la Prezidanto prezentos moralan raporton, la Sekretario raportos pri la grupa agado dum la pasinta jaro kaj la Kasisto konigos la staton de la kaso. Fine la ĉeestantaro aprobos aŭ malaprobos, laŭ starado aŭ sidado, la administradon de la Komitato dum la pasinta jaro kaj ĝi elektos novan Komitaton aŭ reelektos la elirantan, laŭ la reguloj de la paragrafo 8a de la jena statuto.
- Par. 13a Ĉiu propono pri ŝanĝo de la statuto devas esti submetata al la ĝenerala jara kunveno aŭ al eksterordinara ĝenerala kunveno.
En ambaŭ kazoj la kunvokilo devos enhavi la tekston de la ŝanĝopropono. La ŝanĝo nur efektiviĝos se ĝi estas aprobata per du triona plimulto de la voĉdonoj de la ĉeestantaj membroj.
- Par. 14a Pri ĉiuj okazoj ne antaŭviditaj en la jena statuto, la Komitato decidos plene.
- Par. 15a La jena statuto estos deviga tuj post la aprobo de la ĝenerala kunveno al kiu ĝi estos submetata; kaj samtempe la malnova regularo, akceptita la 26an de ~~novembro~~ 1935a, estos nuligita.

februaro

o o o o

Tiu teksto estas aprobata dum ĝenerala kunveno komence de 1984.